GISTO, JUL, 2009
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas: ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj
foraj loĝantoj sentu sin ŝuldaj al la kaso.

.....

GEA-estraro

Kvankam mi legas ĉiujn numerojn de la revuo Esperanto kaj kvankam la afero estis komentita dum Verda Kafo, en tiu oficiala eldonaĵo, kun bedaŭro, oni neniam legis pri la forpaso de nia diligenta, sindona kaj kara samideanino ELIZABETH. Mi mem ja estas unuopulo kaj tre fidis ke nia gaŭcha E-organizaĵo zorgus pri tio. Se mi ne trompiĝas, iam sur poŝtkarto al GEA mi memorigis pri la forgeso sendi tiurilate informon al la radakcio de UEA. Laŭ mi, oni restas ŝulda pri tio al nia tre kara Elizabeth, kiu ĉiam zorgeme traktis sociajn aferojn inter ni, ĉefe kiam malsanis kaj forpasis nia klera Ereno. Ŝian forpason rememorigis min noto pri la morto de Sylla Chaves, en tiu revuo.

ABELOJ

Timiga perspektivo: manko de abeloj en nia suda Brazilo. Ĉu vi kapablas bildigi al vi la diferencon inter ekzisto aŭ malekzisto, de grandaj abelsvarmoj, por la agrikulturo? Sen abeloj multe malpli da floroj estas fekundigitaj. Ja estas aliaj insektoj kiuj vizitas kaj portas , polenon al floroj sed kiuj ne flugas tri Km for kiel la diligentaj abeloj. Rezulto: rikolteblas malpli da fruktoj kaj cerealo...kaj el tio rezultas mankoj kaj prezoaltigo de varoj = inflacio. Granda manko de abeloj konfirmas jeno: kiam en mia hejmo finiĝas dolĉaĵo oni ne lavas la ujon sed jes metas ĝin eksteren, por ke abeloj el la ĉirkaŭaj bredistoj venu kaj elsuĉu la restaĵojn. Laste tio okazis antaŭ tri semajnoj. Ĝis hodiaŭ la ujo disponigas al ili dolĉaĵon sed neniu abelo montriĝas!!

MI...MI...MI...!

Amo al la pronomo MI estigas malfacile elradikeblan egoismon. Homoj kiuj senskrupule uzadadas la pronomon MI, ankaŭ ne hontas servi sin unue, preni plej belajn aŭ grandajn pecojn el pleto proponata de gastiganto, kiam ili scias sin neobservataj. Personoj postiĝemaj, bonedukitaj, hontas uzi unualoke sian MI, evitas komenci skribitan tekston per la hontiga atestilo de egoismo. Ne cedemaj egoistoj, mi observis, ofte motivas kverelon,inter gravuloj eĉ militon ! Pro la Esperanta gramatiko, mi konsentas, foje pli malfacilas devojiĝi, chefe por egoismuloj, ĉirkaŭdiri/skribi la ĝenan komencan MI. Valoras la penon, por ekzerciĝi, pinĉu sin kiam vi refalis en la eraron, por konsciiĝi pri la fikutimo.

GRIPO-A

Oni estu singarda, ĉiutage oni sciiĝas de la Preso ke pli da homoj malsaniĝas, pliaj viktimiĝas de la porka gripo! La gaŭĉaro sentas sin sieĝita. Ĉefe argentinanoj suferis atakon kaj efika vakcino, laŭ mia scio, ankoraŭ ne eltroviĝis kontraŭ tiu plago.

ĈRI

Por la monato Junio kaj Julio ĉiuvespere mi testas la aŭdeblecon kaj raportas laŭ skalo de nulo ĝis 9. Variema, ĝi restadis inter 3 kaj 6, kun ekstera anteno aldonita al tiu ĉina eta ricevilo. Ofte troa atmosfera bruo ĝenas la aŭskultadon en la nuna sezono, kiam multaj kumulus-nimbus kun fulmoj kaj tondradoj ĝenas la sudon de Brazilo.

ANALIZOPETO

Jen, sube, el la portugala tradukita teksto far mi. Enestas eroj malfacile redoneblaj en la tradukaĵo. Mi submetas al via opinio, kiel vi farus, por ke alilanda leganto komprenu ĝuste tiun signifon kiun brazillingvano povas facile kompreni.

Ekzemple, David opinias pri la viro ĵus enveninta en la buson, sidiĝonta je lia flanko: *Devia ter uns, sei lá,50 anos.*

Kiel vi dirus, ĉu vi havas dirkon?

DAVID' KOIMBRA

Al multaj gelegantoj tre plaĉas la drolaj rakontoj far D.Koimbra kiel li lerte scias redoni faktojn. Tial mi, laŭ mia povra kapablo interpreti kaj redoni la vervan enhavon de interesaj tekstoj, mi provis esperantigi ĉi suban. Ĝi estas eltiraĵo de ĵurnala rakonto.

ĜENA PAROLEMULO.

Dum certa epoko mi kutimis veturi al RIO...24 horojn da ŝoseglutado. Malmilda provo. Vespere antaŭ la lasta fojo ekveturi, geamikoj aranĝis feston por mi, dum kiu mi iomete translimis mian kutimon. Sekvatage mi rampis ĝis la busa stacidomo kun la tripoj iom putraj. Io enaĵo rompiĝis, mi kalkulas. Tre tre malbonfartis mi, dum la sidiĝo sur mia loko. En tiu ekstrema momento mi preĝis al la Superulo de l'armeoj, ke neniu sidiĝu miaflanke, por ke ,,,,,mi povos venki ĉi senfinan veturon komfortata de la soleca balzamo. Pasaĝeroj ankoraŭ envenis dum en mia cerebro boletis gasvezikoj. Post nelonge ĉiuj sidlokoj estis okupitaj, minus unu: tiu miaflanka. Kontente mi rigardis Ĉielen kaj dankis.Ĉimomente ulo sub ĉapelo pli larĝa ol kelnera pleto aperis miaflanke kvazaŭ sorĉite, descendinta de la metala tegmento. Li estis eble kvindekjara, magra kaj alta kiel eŭkalipto, sub nazo granda kiel poŝtelefono. Li vidigis rideton karamelo-koloran.

Bonan tagon! kun tri krisignoj, samtempe tuŝante sian ĉapelon per la dorso de la mano. – Mi rimarkis ke estas tipo animplena, ero kiun mi multe NE bezonis, ĉefe ne ulon tian. Oni ja scias kiel kutimas esti ĉapeluzantoj.

Ĉu ĉi, la numero 17? Indikante la lokon miaflankan. Estis. Li akomodiĝis, turnis sin al mi kaj demandis. Vi iros al Rio, ĉu?

La buso iris rekte al Rio...tre direkte.

Mi rigardis al la Ĉielo, kie la Sinjoro eble priridadis min.

La viro ne plu ĉesis paroli dum la tuta tago kaj la nokto kiun mi pasigis enladigita en tiu aŭtobuso. Por provi havigi al mi kelkajn momentojn, mi eĉ ronkis kaj li daŭre paroladis. Tiam mi vere endormiĝis...vekiĝis kaj la ulo anoraŭ paroladis. Kiam ni alvenis en Rio li ekkantis Urbo Mirinda kaj petis akompani lin frapante la manojn. Estis terure malfacile...multe da sortomanko.

Kiam mi rakontis ĉi travivaĵon al miaj amikoj, kelkaj komentis: Se vi estus dirinta ion al li, certe li ne daŭrigadus alparolante vin... Resume: kulpis mi.

La samo, kiam mi suferis kunpuŝiĝon kun kaleŝo. Jes, tio okazis, mi ĵuras je Dio! Oni futbalis ĉe la strato Tenduma, sur sablejo inter la konstruaĵo Atuto kaj Flavbloko. Tute preta eksturmi kun la pilko kontraŭ la golejo el pantofloj, kiam la ĉevala kapaĉo videbliĝis ĝuste je mia flanko. Estis momento plej timiga en mia vivo. Dudek centimetrojn for de mia nazo grandega ĉevalo spiregante kiel okazas al ili. Hufoj, piedoj, gamboj, dentoj kaj mi. La karoserio puŝegis min. Mi vundiĝis. Ŝvelita, malhelpata plu futbali sekvan sabaton en la teamo tiun semajnon fonditan. Iu kritikis min. Denove mi kulpis. Io ĝuste plenumata neniom validas. Ĉu teamo perdis? Ĝi do nenion valoras. Sensortulo kulpas pro sia fiasko.

.....

Domaĝe tro ofte la estorioj far David temas pri aferoj, por mi malinteresaj, ekz. politiko.

ANTAŬENA PUŜO

De infaneco panjo devigis min parkerigi etajn rimojn, germanlingve. Tion mi abomenegis sed pro oftaj trudoj, akompane de punoj, de la parkerigitaĵoj restis al mi preskaŭ nur unu orelo pri longa ol la alia...hi...hi. Nun mi povas konstati multflankajn avantaĝojn por parkerigi etajn tekstojn. Aldoniĝas mia unuagrada lerneja tempo. Ĉiutage la plej lela plej lenantoj de la pleja altaj lenantoj de la pleja altaj lernojaroj devis stariĝi ambaŭflanke de la elireja koridoro kaj laŭte kanti historiajn tekstojn dum la unua kaj kvara jaroj eliris surstraten, hejmen. Plej multe aŭdita strofo restadas en mia menso, eble 70 jarojn poste. Jen ĝi, nacilingve, kun ĝustigita prononco.

“Karavelas ke vem do Ocidente –
Trazendo o marítimo eskol –
Deslumbrando montanja virente –
Desembarka ĵokundo Kabral”.

(Kuraĝulo sentu sin invitata traduki la tekston kaj sendi ĝin al mi).
Eble pro tiuj “surbendigaĵoj” en mia menso restas al mi la emon valorigi la kapablon reciti ion parkere. Tio havas la praktikan utilon, laŭ kuracistoj, bremsi la cerebran oldiĝon, la tro fruan forgesemon.
Jen pravigo por mia insisto ke iu el ni adiaŭe de la VK recitu almenaŭ unu strofon. Domaĝe ĝis nun pokaj el nia rondo komprenis kaj akceptis la ideon. Vi konstatas ke mia propono havas fundamenton, ĝin mi manifestas ne por melki aplaŭdon. Ni havas VK-anojn multe pli kapablajn kaj lertajn ol mia plumpa ekzempligo sukcesas. Eĉ mia propono, ke unu laŭtlegu unupaĝan tekston ankoraŭ efektive ne ekflugis.
.

EN FRENEZULEJO

Sciate ke neniu frenezulo facile konsentas, ke li/ŝi estas ne plene normala homo, estiĝis ĉi suba anekdoto.

Dum vizito al frenezulejo okazis ke iu demandis al la direktoro, kiun kriterion tie ili adoptas por konstati, ĉu homo estas vere freneza aŭ ne? La direktoro respondis: ni kondukas la personon al banejo kun akvoplena kuvo, ni disponigas al li/ŝi unu kuleron, sitelon kaj glason kaj teste taskas: se vi devas malplenigi la bankuvon, kion vi farus? Se vi pensas ke li elektis la plej grandan ujon, la sitelon, ankaŭ vi rajtas tuj elekti, ĉu vi volas restadi en kolektiva ĉambro aŭ en privata!...hi...hi...hi!
- Homo mense sana elektas elpreni la defluiejan ŝtopilon funde de la kuvo.

Oni ridas kun poloj (el La ondo de Esperanto):

- Ha lo! Ĉu policejo?
- Ne, privata loĝejo, sed mi povas voki mian edzinon!
.....
- Naskiĝis al mi ĝemeloj.
- Kaj, al kiu ili similas?
- Kompreneble, unu al la alia.
.....
La vira vivo aspektas jene: unu virinon vi amas, vi loĝas kun la dua, vi dormas kun la tria, infanon vi havas kun la kvara kaj amas vin la kvina. Kaj la kvina estas via patrino.
- Kial vi, sinjoro, postiradas min?
- Nun, kiam vi turniĝis al mi fronte, mi ne scias – kial.
- Viaj haroj komencas griziĝi. Ĉu vi uzas rimedon por haltigi tion?
- Jes, mi nun divorcas.

DEKLARACIO PRI LA ESENCO DE ESPERANTISMO.

Tial ke eble multaj inter ni ankoraŭ ne legis ĉi Deklaracion, mi aldonas en la lasta paĝo la ĉefparton.